

La klingona lingvo el tipologia vidpunkto

„La klingona estas la oficiala lingvo de la klingona imperio.“ komenciĝas la lernolibro de ĉi tiu planlingvo, kiun verkis la usona lingvisto Marc Okrand antaŭ pli ol dudek jaroj por la sciencfikcia seriario *Star Trek*.¹

Intertempe formiĝis movado de amantoj de ĉi tiu idiomo kaj de la futurisma mondo enhavanta ĝin, aperis pliaj lernolibroj kaj vortaroj, kaj eĉ literaturo (ekz. traduko de Hamleto); ŝerce(?) kelkiuj asertas, ke la klingona jam havas pli da parolantoj ol Esperanto.

En la antaŭparolo kaj aliloke² en la klingona lernolibro estas vekata la impresoj, ke la klingona estas iom malfacile alirebla lingvo, kiun oni ankoraŭ ne tute komprenas. Eĉ la fieraj Klingonoj mem trovis sian lingvon nepraktika por eksterimperia komunikado kaj, „kune kun la plej multaj aliaj registaroj, akceptis la anglan kiel *lingua franca*“ (p. 10). Do ŝajnas, ke tiu lingvo estas io tre fremda al homoj, kaj ja entute ne estus surprize, ke lingvo de eksterteruloj estus tia, sed ĉu vere la klingona tiom strangas?

Skribo

La propran skribsistemon de la klingona, nomatan pIqaD, la aŭtoro ne uzas en la gramatika skizo kaj vortaro, ĉar ĝi estas „ankoraŭ ne bone komprenata“ (p. 11), anstataŭe li uzas sistemon „baziĝantan sur la angla(!) alfabeto“ (samloke). En praktiko oni renkontas latin-bazitan alfabeton principe foneman, sed enhavantan kelkajn digrafojn, mankas diakritaĵoj; la literoj estas parte minuskloj, parte majuskloj, sen ajna racie komprenebla kaŭzo,³ nur inter *q* kaj *Q* ekzistas fonema diferenco (kiun oni povus solvi per alia grafemo, ekz. la neuzata *k*); tamen ĉi tio bone efikas cele al strangigo de la klingona, kp. la aspekton de la frazo *chaHvaD Soj qem yaS* „la oficiro donas al ili mangĝaĵon“.

Fonologio

La klingona distingas la konsonantajn fonemojn (alfabeta vico laŭ la lernolibro) *b* /b/, *ch* /tʃ/, *D* /d/, *gh* /g/, *H* /x/, *j* /dʒ/, *l* /l/, *m* /m/, *n* /n/, *ng* /ŋ/, *p* /p^h/, *q* /q^h/, *Q* /q̄x/, *r* /r/, *S* /s/, *t* /t^h/, *tlh* /tʰl/, *v* /v/, *w* /w/, *y* /j/, kaj ' /ʔ/, kaj la vokalojn *a* /a:/, *e* /e/, *I* /ɪ/, *o* /ōu/, *u* /u:/, kiuj kun *w* kaj *y* formas la diftongojn *aw*, *ay*, *ey*, *Iy* (t.e. [i:]), *oy* (/ɔɪ/), *uy* kaj *ew*.

Estas rimarkinde, ke aperas unuflanke fonemoj kaj fonoj tre konataj al anglalingvuloj, ekz. la tipologie maloftega /ōu/ por <o> aŭ la distribuo ɪ [-longa] – i [+longa],⁴ aliflanke per kvar guturaloj *gh*, *H*, *q* kaj *Q* kaj la laterala frikativo *tlh* la klingona prezentas por Angloj preskaŭ netransasalteblan prononcan barilon kaj antaŭ ĉio tuj aŭdeblan fremdaĵon.

La klingona havas nefiksan kaj nemoveblan vortakcenton, falantan sur la stamon, ĝuste kiel en la angla.

Morfologio

¹ Fakte la unuajn klingonajn vortojn por la unua filmo de *Star Trek* el la jaro 1979 elpensis la ĵus mortinta James Doohan, rolanta dum jardekoj kiel ĉefingeniero C. Montgomery Scott. Formante la lingvan sistemon Okrand transprenis ilin, kun sufiĉe da peno (la Doohan-aj vortoj en lia libro aperas grandparte en la sekcio „Clipped Klingon“ (p. 72 s.), do „neklara, koncizigita klingona“).

² Ekz. en la enkonduko al la fonologio (p. 13), kie anstataŭ akurata priskribo de la elparolo estas rekomendite iom da tempo kunvivi kun Klingonoj por lerni paroli senakĉente.

³ Mokulo dirus, ke skribo pli komplika ol la lingvo mem ja forte rememoras la anglan...

⁴ La neanglajn diftongojn *uy* kaj *ew* verŝajne postulis fonemara sistemeco.

En la klingona gramatiko distingeblas laŭ sia sintaksa funkcio la jenaj vortospecoj: substantivoj, adjektivoj (kvankam Okrand asertas, ke tiaj ne ekzistas, vd. sube), verboj, adverboj, pronomoj, konjunkcioj kaj partikuloj, do neniu nekutimaj aldono aŭ manko rilate lingvajn kategoriojn. Ne ekzistas vortospecaj markiloj, ankaŭ ne por adverboj, kiuj ja eĉ en la angla havas propran sufikson. Klingona radiko senprobleme povas transiri al alia klaso, kio videbliĝas nur per vortordo aŭ la kombineblo de koncerna radiko kun speciale substantivaj aŭ verbaj afiksoj.

Ne ekzistas kazofinaĵoj en propra senco, la rekta objekto estas indikata per rigida vortordo, kiel en la angla. Okrand elektis por la klingona la bazan ordon objekto – predikato – subjekto, kiu laŭdire devenas el la karaiba lingvo hiŝkarjana; ĝi tie ja ekzistas, tamen nature la ĉefa kaŭzo elekti tian (tipologie maloftegan) vortordon estis strangigo de la klingona al parolanto de la angla, kiu havas la rekte inversan fraz-aranĝon, ne estante samtempe io vere fremda aŭ malfacile komprenebla: estus pli da diferenco inter la klingona kaj la angla, se la unua havus liberan vortordon kaj sintaksajn markilojn.

Ĉi tiu inverseco troveblas en diversaj punktoj de la gramatiko, tiel ke klingona legata de la frazofino al la komenco parte plene ripetas anglajn strukturojn.

Klingona substantivo formiĝas el radiko, kutime unusilaba, kaj ĝis kvin sufiksoj havantaj diversajn gramatikajn kaj leksikajn funkciojn. Sufiksoj ne estas aldonendaj, se ili ne estas bezonataj, klingonaj radikoj do estas „solstarivaj“. Unualoke post radiko aperas la t.n. unuatipaj sufiksoj -'a' , -eg', *Hom* , -et' kaj -oy , -ĉj/-nj'. Poste venas la multenombraj sufiksoj -pu' por parolkapablaj estaĵoj, -Du' por korpopartoj kaj -mey por ĉio alia.⁵ Kiel en aliaj aglutinaj lingvoj ili ne estas devigaj, se pluraleco esprimiĝas jam alimaniere. La triatipaj sufiksoj -qoq , tiel nomata', -Hey , ŝajna/e' kaj -na' , certa/e' esprimas modecon. La kvaratipaj sufiksoj egalas posesivajn kaj demonstrativajn pronomojn, ekz. -wIj , mia' (rilate al objekto), -wi' , mia' (rilate al estaĵo parolkapabla, tia distingo ial ne ekzistas ĉe la tria persono), -vam , ĉi tiu' aŭ -vetlh , tiu'; estas rimarkinde, ke tiuj du diverskategoriaj pronomoj en la klingona apartenas al la sama morfologia kategorio, kio malebligas samtempan esprimon de aparteneco kaj difiniteco, tamen rigardo al la angla klarigas la aferon: ankaŭ tie ne eblas diri **this my weapon*. Fine la kvinan tipon de sufiksoj formas sintaksaj markiloj, kiuj ja rememoras kazofinaĵojn, sed pro ilia relative konkreta signifo eblas ilin konsideri postpozicioj, krome -mo' , pro' ligiĝas ankaŭ kun verboj (kiel naŭatipa verba sufikso), signifanta ,ĉar': -Daq , en, al', -vo' , de', -mo' , pro', -vaD , por'; ne sintaksan, sed pragmatikan funkcion havas la sufikso -'e' , kiu topikiĝas la substantivon apartenantan al ĝi.

Se oni rigardas la ekzemplon sur p. 29a, *QaghHommeyHeylljmo'* , pro viaj ŝajne malgrandaj eraroj', ĝi prezentas simple inversigitan anglan *due to (mo') your (Ij) appearant (Hey) /pluralo/ (mey) minor (Hom) error (Qagh)*, kun la escepto de la plurala formaĵo, kie tio pro la manko de prefiksoj (ion nekutima por la angla, kiu eĉ ne konas prefiks-verbojn kiel la germana aŭ aliaj eŭropaj lingvoj) ne eblas en la klingona.

La substantiva vortfarado de la klingona distingas plenan kunmetadon (laŭ la donitaj ekzemploj eblas nur determinativaj kunmetaĵoj, kiel en la angla) kaj la t.n. dusubstantivan konstruon, kiu anstataŭas genitivon, ekz. *jaghpu' yuQmeyDaq* , al la planedoj (*yuQ*) de la malamikoj (*jagh*), videbla en tio, ke la unua substantivo ne povas alpreni sintaksan sufikson kaj tial ne formas memstaran propozicieron, kiel en ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, kiuj havas genitivon.

La plej grandaj diferencoj inter la angla kaj la klingona aperas ĉe la verbo. Ĉi tiu konsistas el prefikso, radiko kaj ĝis naŭ sufiksoj. La prefiksoj tamen parte egalas al la personpronomoj de la angla, ekz. *jiQong* , mi dormas', *biQong* , vi dormas' ktp., sed ili indikas ankaŭ la objekton,

⁵ Aldonita al radikoj, kiuj pro sia signifo alprenas la aliajn pluralajn sufiksojn, -mey esprimas kumulativecon, ekz. *puqmey* , infanoj en la tuta ejo'.

ekz. *qa-* ,mi – vin’, *DI-* ,ni – ilin’; dua serio servas kiel imperativa prefikso por la dua persono, ekz. *yIQong!* ,dormu’, *gho-* ,vi – nin’.

Da sufiksoj ekzistas la jenaj tipoj:⁶ 1. *-egh* ,sin’ (*jIqIp’egh* = *I hit myself*); *-chuoq* ,unu la alian’ (*maqIpchuoq* = *we hit each other*). 2. La duatipaj sufiksoj esprimas la sintenon aŭ dispozicion de la subjekto rilate al la ago, ekz. *Heghqang* ,li⁷ volas morti (*qang*)’ *nuqIpvIp* ,ili timas bati (*qIp*) nin’. 3. Ŝanĝo: *-choH* tradukeblas al Esperanto per ,ek-’ aŭ ,iĝ’, *-qa’* per ,rekomenci (ion fari)’. 4. La sufikso *-moH* egalas al Esperanta ,ig’. 5. Al la kvina tipo apartenas du malsamaj sufiksoj; *-laH* signifas ,povi, kapabli’, dum *-lu’* fakte formas pasivon, tamen laŭ iom stranga metodo: ĝia baza signifo estas ,nedifinita, nekonata subjekto’, kaj tiel ĝi inversigas la sintaksan signifon de la verbaj prefiksoj rilate aganton kaj agaton; tio ja memorigas ergativan konstruon, sed kiel sufiksojn oni eksplicite ne uzas la neŭtralajn, senobjektajn, sed tiujn de la tipo ,triapersona objekto’, ekz. *wIlegh* ,ni vidas lin/ĝin/ilin’ – *wIleghlu’* ,io vidas nin, ni estas vidataj’. 6. La sesatipaj sufiksoj esprimas subjektivan (realecan) modecon, ekz. *-bej* ,certe, sendube’ aŭ *-ba’* ,evidente’. 7. La klingona ne esprimas tempecon per tensoj, sed distingas kvar t.n. aspektojn, fakte kombinaĵojn el aspektecaj (laŭ angla konceptiĝo, do la imperfektiva aspekto esprimas ekskluzive progresan admanieron⁸) kaj admanierecaj kategorioj, ekz. *-ta’* ,fariteco, plenumiteco’, *-II’* ,kontinuado (cele al io)’. 8. Ĉi tiu kategorio enhavas nur unu eron, *-neS*, kiu esprimas honorigon, ekz. *qaleghneS* ,mi havas la honoron vin vidi’. 9. Kiel ĉe la substantivo lastpozicie aldoniĝas sintaksaj markiloj, sed ĉi tiuj havas la funkcion de subjunkcioj aŭ konjunkcioj, ne de adpozicioj, ekz. *-chugh* ,se’, *-’a’* ,ĉu’ (por demandoj). Pro kaŭzo al mi enigma en ĉi tiun kategorion oni kalkulis la sufikson *-wI’* , kiu pli malpli signifas ,anto’, do ,ilo’ aŭ ,isto’, ekz. *So’wI* ,kaŝilo’ (aparato nevidebliganta kosmoŝipon), *baHwI’* ,pafisto’; simile funkcias la apendice aldonita ,substantiviganto’ *-ghach*, kiu sekvas sufikshavajn verbformojn, kun la signifo ,ado’; tiaj formantoj kompreneble apartenus al ĉapitro pri vortfarado, se ekzistis tia en la libro.

Ne al la sufiksoj de rigida ordo apartenas la t.n. „rovers“ ,modifiloj’, kiuj modifas la elementon, post kiu ili aperas: *-be’* ,ne’ (ĝenerala), *-Qo’* ,ne’ (por neita ordono) kaj *-qu’* ,emfazo’.

Laŭdire anstataŭ adjektivojn la klingona havas verbojn de la signifo ,esti a’, tamen la objektlingva materialo klare montras, ke temas pri memstara kategorio, ĉar radiko en adjektiva uzo stariĝas post la substantivo kaj povas alpreni la kvinaklasajn sufiksojn substantivajn (plia kaŭzo kompreni ĉi tiujn kiel postpoziciojn, ne finaĵojn), kp. *veng tIn* ,granda urbo (*veng*)’, *veng tInDaq* ,en la granda urbo’ (denove inversa angla vortordo).

Nur mallonge ni pririgardu la aliajn vortospecojn:

Ĉe la personaj pronomoj, kies uzado ne estas deviga, la klingona ne distingas inter maskla kaj femala referenco, sed kaj en singularo kaj en pluralo inter referenco al objektoj kaj parolkapablaj estaĵoj (kp. la formojn pluralajn supre).

Laŭdire la klingona iam havis nombrosistemon triuman, tamen en la objektlingva materialo ne restis ajna ŝpuro de tio. La nombroj estas formataj pli-malpli kiel en Esperanto aŭ la indonesia aŭ multaj aliaj lingvoj; la diferenco al la angla konsistas el la laŭsistema kombino de la nombroj inter 13 kaj 19 (*wa’maH wej* ,unu-dek tri’), kie la angla (kaj la germana) havas neregulan inversion.

Kuriozaĵon oni rekontas ĉe la konjunkcioj: Dum la lingvo enhavas sufiĉe da homonimoj kaj neklaraĵoj, do la normalaj neregulaĵoj de la etnaj lingvoj – la klingona estu ja kvazaŭ iu etna,

⁶ Antaŭ ĉi ĉiuj sufiksoj devus stari kiel deka tipo la sufikso *-Ha’*, kiu signifas ,mal-’ aŭ ,mis-’, sed kiu aperas nur sur p. 47 kiel t.n. modifilo, ĉar laŭdire „la klingonaj gramatikistoj insistas“ je tio (samloke).

⁷ Mi uzas ,li’ en klasika, laŭfundamenta signifo kiel referencilon al personoj de ajna sekso, kvankam la „moderna“ lingvouzo malvastigas ĝian signifon al maskla pronomo.

⁸ Nova termino por la germana ,Aktionsart’, angla ,manner of action’, ĉar la ĝisnunaj Esperantaj korespondaĵoj (subaspekto k.s.) ne estas akcepteblaj.

historihava lingvo –, la diferencigo inter vort- kaj propozicikombinaj konjunkcioj okazas per nepreteratentebila inversigo de la koncerna vorto: *je* – ‘*ej*, kaj’, *joq* – *qoj*, kaj/aŭ’, *ghap* – *pagh*, aŭ...aŭ’. La unua funkcias kiel la hindeŭropa konjunkcio *-*k^we*, do sekvas la aldonatan vorton, ekz. *DeS* ‘*uS je*, brako kaj gambo’.

La libro listigas kelkajn radik-adverbojn, sed nenion diras, ĉu kaj kiel oni povas derivi aŭ alimaniere formi ilin de aliaj radikoj. Ili kutime staras en la komenciĝo de la frazo.

Interjekciojn kaj nomojn oni povas preterlasi, ili ne donas interesajn informojn pri-strukturajn.

Sintakso

Pri kelkaj aspektoj de la sintakso mi jam komence parolis, anstataŭ subjunkciojn la klingona uzas la naŭatipajn sufiksojn verbajn; tamen surpapere tio apenaŭ kaŭzas diferencojn al la frazkonstruoj konataj el la eŭropaj lingvo, kaj estas interesa fikcia demando, ĉu lingvisto esploranta la parolatan klingonan eble ne klasifus ilin kiel senakcentajn subjunkciojn.

Interesan konstruon havas la relativaj subpropozicioj. Ankaŭ ili estas forme markitaj per naŭatipa sufikso; la propoziciero, al kiu ili rilatas, estas kvazaŭ enkorpigita en ili en pozicio laŭokaze objekta aŭ subjekta, ekz. *qlppu* ‘*bogh yaS*, la oficiro (*yaS*), kiu batis lin’ – *yaS qlppu* ‘*bogh*, la oficiro, kiun batis li’; ĉi tian pretan propozicion oni povas enigi en kutiman frazon en objekta aŭ subjekta pozicio;⁹ kvankam ĉi tiu konstruo ne estas transpreniĝo el la angla, ĝi havas tie strukturan paralelon, kp. la frazon *the man she saw yesterday’s car*, la aŭto de la viro, kiun ŝi vidis hieraŭ’, kie rolas relativa frazo kiel atribuaĵo.

Deklarajn frazojn oni formas laŭ ĝermana modelo, helpe de la pronomoj ‘*e*’ aŭ *net*, ‘ĝi, tio’, ekz. *qama* ‘*pu*’ *DIHoH net Sov*, oni scias, ke ni mortigas kaptitojn’ („prisoner-s we-kill that knows“: inversa, plene angla frazkonstruo).

Kopulo ne ekzistas en la klingona, kp. la frazon *thllIngan jiH*, Klingono (estas) mi’.

Demandoj estas konstruataj kiel deklaraj frazoj, do la demandaj pronomoj situigas en propozicio laŭ la sintaksa funkcio kiel subjekto aŭ objekto, dum demandaj adverboj kiel aliaj adverboj kutime aperas en la unua pozicio.

Fine la komparadon esprimas miksaĵo de sintaksaj kaj leksikaj rimedoj, kian mi en tia formo ne konas el alia lingvo. Laŭ la formulo ,(objekto1) (kvalito) *law*’ (objekto2) (kvalito) *puS*’, kie *law*’ signifas ,multi’ kaj *puS*, ,malmulti’,¹⁰ oni formas mezgradan komparon, per aldona vorto supergradan.

Fine estas rimarkinde, ke nenorma, mallongigita klingona en detaloj pli similas al la angla (kp. la ĉapitron 7an, p. 72 s.), oni ekz. formas imperativon per la nura radiko, sen prefikso (*[yI]baH*, pafu’).

Resumo

En la libro mankas pliaj informoj pri vortfarado kaj kelkaj aliaj detaloj de la gramatiko, tamen la materialo sufiĉas por esplori la strukturon de la lingvo kaj kompari ĝin kun la gepatra lingvo de ties inventinto kaj de la plimulto de la nuntempaj parolantoj.

Jam plurfoje oni vidis, ke la klingona ripetas strukturojn de la angla, kvankam en kaŝita formo. La strangaĵoj por anglalingvuloj, ekz. rilate la fonemaron la kvar guturaloj, ja donas al la lingvo fremdan aspekton, tamen ili ege malplimultas en komparo al la paraleloj inter ambaŭ lingvoj.

Oni ne lasu sin trompi de la ŝajnaj diferencoj tipologiaj – la klingona klare estas aglutina lingvo, la angla izola-fleksia –, por la semantika analizo ne gravas, ĉu ideo esprimiĝas per kvar sinsekvaj vortoj aŭ kvar sinsekvaj morfemoj formantaj unu vorton. Krome la klingona ne

⁹ Bedaŭrinde la gramatiko ne difinas, kiel aspektu relativa konstruo de la tipo ,je kiu’, ,kies’ ks.

¹⁰ Tamen, ne ekzistas informoj, ĉu oni povas uzi ĉi tiujn vortojn ankaŭ en aliaj frazoj kaj ĉu oni ilin konjugacias aŭ ne. Eble do temas pri inventita etimologio por partikuloj.

„kondutas“ kiel tipa aglutina lingvo, kie la morfemoj estas iel ligataj, ofte per vokalhamonio (kp. turke *Oymağaç Höyüğü* ,la *höyük* (~ruinejo) de *Oymağaç*’ kun la sonŝanĝo $k > g$ kaj la formo *-ü* de la morfemo *-u/-ü/-i/-ı* ,lia, ĝia’ depende de la antaŭa vokalo), sed kombinas senŝanĝajn sufiksojn, kio estas tipologie malofta kaj memorigas izolajn lingvojn. Kiel en la angla la radikoj estas tre ofte unusilabaj, kaj eĉ kompleksaj nocioj esprimiĝas per simpla vorto, ne per sistema kaj larĝa vortfarado kiel ekz. en Esperanto.

Nur malofte oni trovas klingonan lingvaĵon, kiu ne tradukeblas per unu vorto aŭ kutima frazo al la angla. Ne aperas sufiksoj, kiuj esprimus ideon negravan al homo, kio tamen penseblas, temas ja pri ekstertera kulturo.

Fine, komparu la frazon *romuluSngan HoSqu’ HoHlaHbej tlhIngan jaq* ,sentima Klingono certe povas mortigi (eĉ) tre fortan Romulanon’ kun la angla traduko: *a* (sen traduko) *bold* (*jaq*) *Klingon* (*tlhIngan*) *certainly* (*bej*) *can* (*laH*) *kill* (*HoH*) *a very* (*qu’*) *strong* (*HoS*) *Romulan* (*romuluSngan*).

Se fremdeco signifas paroli inverse, la klingona estas fremdega lingvo, mi tion tamen pridubas.

Literaturo

-Cornelia MANNEWITZ, *Zur Struktur von Aliensprachen*, en: Detlev BLANKE (red.), *Zur Struktur von Plansprachen. Beiträge der 10. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 17.-19. November 2000 in Berlin*, Berlino 2001 p. 141-159

-Marc OKRAND, *The Klingon Dictionary*. Novjorko k.a. 1992

Das Klingonische aus typologischer Sicht (Knapptext)

Das Klingonische, eine für die U.S.-amerikanische Science-Fiction-Serie *Star Trek* geschaffene Plansprache, wird gewöhnlich als besonders fremdartig dargestellt. Ein erster Blick auf Lautstand und Grammatik scheint dies zu bestätigen, doch zeigt eine genauere Analyse, dass die syntaktischen und sprachlich-konzeptionellen Parallelen zum Englischen die auffälligen Abweichungen (vier gutturale Phoneme, agglutinierender Sprachbau) bei Weitem überwiegen, besonders beim Nomen; letztendlich entsprechen zahlreiche klingonische Syntagmen schlicht ihren englischen Übersetzungen in umgekehrter Reihenfolge, so dass sich unter „wilder“ Oberfläche doch nur allzu Bekanntes verbirgt.